



**5(141)
2013**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Rajmund Bergel (1894 – 1937)

Toruno – poemo pri malnovaj muroj

[Toruń – poemat starych murów]

Toruno malnovmura, gotiko preĝema,
Puntaĵ' de brikaj arkoj, portaloj, ornamoj,
Kie pasintpurpuro brulas en sunflamoj
Kaj teksas rememorojn eksa temp' dormema.

Super la urbon kreskis la preĝejaj turoj,
Ĉiu ĉielen fugas en preĝ' sonorila:
Sanktaj Johan', Jakobo kaj Sankta Maria,
Sonoras vivaj ŝtonoj per preĝo-murmuroj.

Kaj kiam ĉirkaŭvenos nebulo vespera,
Tiam el stratoj eĥo de l' pasinta gloro
Per romantik-balado ĉarmege aperas.

Jen fikse rigardante brilantan stel-lumon
Urbo pro ĝoj' ebria kantas kun adoro
Omaĝe al Li, kiu haltigis la sunon.

Witold Zechenter (1904 – 1978)

La Urbodomo

[Ratusz]

Ŝpiniĝas la miraklo sorĉa, muta, vera
En iluzia vero de l' febla lun-lumo,
Kiu malsupren falas kvazaŭ anĝelplumoj
Kaj mirinde pentriĝas en legend' mistera.

El urbodoma turo jam laŭtas plenhoro ...
Malĝojo penson strangan etendas sur l' koro
Kaj subite estingas sorĉ-fabelan forton.

En ĉi urbdomon kun praa spirito
Esenco de pasinto estas sorĉ-fiksita,
Respegulas tiaman favoron de l' sorto.

Jan Galkowski (1926 – 1989)

Bildkarto de malnova Toruno

[Widokówki starego Torunia]

Inter ĉi turoj, muroj kaj kreneloj
ŝanĝis jarcentoj la teron de duko,
urbon de kruckavaliraj kasteloj
en urbon de bongustaj mielkukoj.

En stratangulo sidas brikdometo
kvazaŭ laca maljunulo kun sulkoj,
tro mallarĝa nun ŝajnas ĉi strateto,
pavimo drola, ronda kiel bulko.

Per oraj vitro kaj ruĝ-bruna briko
rigardas ĝi ĉi placon en Toruno,
de kie iam juna Koperniko
mire observis eklipson de l' suno.

La saman sunon dumtage ĝojante
brikdomo – avo brilas per glazuro,
kaj nokte al la steloj altigante
fieras digne la torunaj muroj.

tradukis Józef Gąsiorowski

Belega Toruno kaj Tagoj de Antoni Grabowski

Dum la 156-a naskiĝdatreveno de la elstara torunano, esperantisto, lingvisto, poeto kaj tradukanto Antoni Grabowski ni travivis belajn tagojn. Teresa Nemere kaj grupo de fervoraj kaj sindonemaj torunaj esperantistoj, precipe el klubo „Flamo” aranĝis vere valoran renkonton.

Sabate, la 8-an de junio 2013, en Pedagogia Biblioteko oni apertis ekspozicion de la esperantaj beletraĵoj „La pola literaturo en la esperanta lingvo”, kiu plaĉis kaj al la partoprenantoj de la aranĝo kaj al la vasta publiko.

Enkadre de la renkonto Teresa Nemere prelegis pri „Antoni Grabowski – elstara esperantisto inter elstaraj loĝantoj de Toruno”; junularo de „Studio P” recitis poemojn tradukitajn esperanten de Julian Tuwim (la elpaŝon bonege reĝisoris Lucyna Sowińska); Halina Gorecka, red. de la esperanta eldonejo „Sezonoj” en Kaliningrado kaj Lidia Ligęza de Krakovo prezentis problemojn de nuntempaj tradukantoj esperanten kaj Andrzej Grzębowski de Bydgoszcz rekomendis turismajn servojn de sia firmao.

Posttagmeze ni vizitis la Etnografian Muzeon kun ties konstante montrataj kolektoj kaj interesege ekspozicio „Sekretoj de la ĉiutaga vivo. La popola kulturo kaj ĝiaj limzonoj de Kujavio ĝis Baltiko(1850-1950)”. La temon oni prezentis en jenaj partoj: Naturo kaj historio, Pri vesto, higieno kaj manĝado, Vivritmo, Laboro, Kiel oni festis kaj je kio oni kredis, Dum libertempo, Novaj horizontoj, Serĉado de beleco. La lastan signalvorton oni povas resumi jene: „Kreante aŭ aĉetante diversajn objektojn, ĉiutagaj, hejmaj religiaj kaj ritaj oni ofte atentis pri ilia estetiko. Gravis koloroj, ornamaĵoj, formo agrabla por okulo. Oni ĉiam strebis, ofte instinkte, plibeligi sian proksiman mondon, kolorigi ĝin. Kun la paso de tempo, influe de la nobela kaj urbana kulturo, tiu strebo fariĝis tiom grava, ke komencis ekaperi objektoj, kies unika funkcio estis ornamado de la homa ĉirkaŭaĵo”. Tra la ekspozicio esperantlingve, sprite kaj ĉarme gvidis nin laboranta en ĉi Muzeo Maria Pokrzywnicka.

Fine de la tago okazis „La mielkuka vespero” – renkonto kun la torunaj geesperantistoj ĉe spickukoj, kafo kaj teo en Kelo sub sanktaj Johanoj (apud katedralo al tiuj sanktuloj). Krom la babilado kaj konsumado „Legendon pri la torunaj spickukoj” en la propra prilaboro brile rakontis Eugenia Algusiewicz kaj Józef Gašiorowski prezentis versaĵojn pri Toruno de diversaj aŭtoroj en la propra traduko esperanten.

Dimanĉe, la 9-an de junio ni de mateno vizitis la malnovan urbon. Nia gvidantino, tre ekzakta kaj kompetenta, reganta belan Esperanton estis Kinga, filino de la Ĉeforganizantino, kiu gvidis la duan grupon. Ni ekrigardis belegajn, gotikstilajn konstruaĵojn, la faman urbodomon, grandiozajn preĝejojn, la kurban turon kaj reston de fortikaĵoj. Krom historiaj restaĵoj plaĉis al ni novaj, metalaj monumentetoj: de la Flutludanto, kiu mezepoke, ludante fluton, elkondukis el la urbo ranamason kaj nun ornamas kune kun ranoj la urban fontanon; de Azeneto – simbolo de la urba bonstato, ĉar ĉiuj gravaj varoj estis ĉi-maniere transportataj kaj de precipe kara al koro de ĉiu krakovano monumenteto de Hundeto Fafik, kiu kune kun ĉapelo kaj ombrelo de profesoro Filutek rememorigas la epokon de krakova „Przekrój” kaj krime likvidita kafejeto „Fafik”.

Ni vizitis ankaŭ Muzeon de Nikolao Koperniko aranĝitan en lia familia, gotika domo. Tie ni travivis la spektaklon "Toruno en tempo de Koperniko" prezentita hepe de lumo kaj sono sur gracia skulptomodelo de Toruno kun komentario en la lingvo Esperanto, kiu estas unu el 9 lingvoj de la prezento. Interesa ankaŭ estis propr-mana pretigo de la spickukoj laŭ elektitaj kokiloj. Poste finbakitajn spickukojn oni povis forpreni kiel memorajon.

La sanktan meson ni partoprenis en grandioza, toruna katedralo al Sanktaj Johanoj.

Posttagmeze ni ĝuis koncerton en la Urbodomo, kie francoj Joseph Sage, Thierry Meunier kaj Bertrand Blondet helpe de malnovaj instrumentoj kaj voĉo prezentis muzikon de trubaduroj kaj truveroj (XIII jarc.) kaj muzikon kortegan kaj popolan (XVI-XVII jarc.). Dum paŭzoj en la progra-

mo ni vizitis kelkajn agrablajn kafejetojn, kie krom bongustaj kafoj, teoj kaj glaciaĵoj regis neripetebla etoso de la digna, malnova, sed bone prosperanta urbo, konvinkita pri sia graveco.

Vespero jam estis dediĉita al babilado kun la Mastrino kaj ŝia familio, ĉar ni havis honoron kaj plezuron loĝi ĉe Teresa Nemere mem. Okazis, ke ekster ŝiaj esperantaj devoj, lastatempe precipe ekscitas ŝin, akiro de la nova ŝranko. Ŝi kolektis jam pli ol dek kvin tekstojn de amikoj, kiuj partoprenis en serĉado de la ĝusta meblo kaj poste ĝojis kaj gatulis pro la sukcesa aĉeto.

Kaj oni povas imagi, ke Antoni Grabowski mem volonte partoprenus en ĉi-ludo per sia dek-trisilaba, pola aleksandrino, per kiu li tradukis "Sinjoron Tadeon", por danki pro la jubilea aranĝo:

En belega Toruno lokiĝis Tereza,
Ulino dokta, prava, plentakta, kompleza.
Ne ŝajnis, ke minacas al ŝi iu manko,
Sed okazis, ke revas ŝi pri nova ŝranko.
Ĉi ŝranko la imagon kaj ŝonĝojn turmentis,
La ino en ĉi temo obstaklojn inventis,
Ĉar ŝranko tia devas, tute kompreneble,
Esti granda, utila kaj kondukti meble,
Sed antaŭ ĉio devas priservi animon,
Esti bela, bonstila, elvoki estimon,
Havi simpl-noblan formon, kaj ĉiu detalo
Povas esti ornama, sed ekster banalo.
Tian ŝrankon Tereza en songoj ekvidis
Kaj volis ne rimarki, ke kunuloj ridis
Pruvante, ke ne eblas pli longe persisti,
Ke tia ŝranko simple ne povas ekzisti.
Sed subite favora, ĉiela potenco
Decidis gracoplene: Estos rekompenco
Por laciĝinta korpo kaj febla spirito.
Hejmanoj, vizitantoj vidas kun ekscito
Ĝustan meblon el songoj, malteran aperon,
De la posedantino ĝojon kaj fieron.
Nobla, belforma ŝranko kun brilaj fermiloj
Fariĝis grava temo de multaj babiloj
Plenaj de ho-oj, he-oj kaj vera raviĝo.
Tia ŝranko montriĝis signo de l' prestiĝo.
Mi deziras elkore: Daŭru ĉi etoso
Kaj gardu Vin, Tereza, kontraŭ viv-kaoso,
Donu al Vi feliĉon kaj volon por agi
Kaj ĉion bonan, kion Vi povus imagi ...
P.S.
Vi rajtas en ĉi ŝranko teni la amanton,
Sed al mi ŝajnas, ke ĝi estos ESPERANTO.

Post la sukcesa restado en belega Toruno kaj kontaktoj kun valoraj homoj, post esencaj, variaj travivaĵoj ni, ege kontentaj, revenis hejmen. Nekredebla afero, ni tamen rimarkis, ke Krakovo estas la samgrade bela.

Lidia Ligęza kaj Grażyna Porada



Somero en vortprovizo kaj frazeologio

Finfine ni ĝisatendis someron, kvankam ŝajnis, ke ĉi-jare ne venos. Ĉiu trapasos ĝin laŭplaĉe kaj laŭbezone, ne nepre la same. Verŝajne poste ni deziros priskribi nian libertempon por la korespondaj amikoj. Ni rememorigas ĉi-cele vortojn kaj parolturnojn ligitajn kun ĉi jarsezono, en kiu en varmo floradas la plantoj kaj rikoltiĝas greno. La klasikuloj rimarkis: Ŝiru rozojn en somero, ĉar en vintro ili ne estos. Kiu kolektas dum la somero, tiu estas filo saĝa.

Do ni agrable **somerumu** aŭ **trasomerumu** ĝuante pejzaĝojn baniĝantajn en la brilo de la suno. Ni ankaŭ povas **sunbani**, brunigi al si la haŭton ĉe la suno, **sunumi** al si la krurojn, kaj eĉ sin rosti sur la plaĝo, sed oni devas atenti, por eviti **insolacion** aŭ **sunfrapon**. Sur la plaĝo nepre ni bezonas **plaĝkostumon**, **banŝorton**, **kontraŭsunajn okulvitrojn** kaj oleon aŭ kremon kontraŭ **sunbrulumo**. Praktike estas sidi sur **strandotuko**, kovrilo aŭ **kuŝ-seĝo**. Infanoj konstruas **sabl-kastelojn** aŭ faras **sabl-babaoj** per siteletoj kaj ŝpatetoj aŭ ludas pilkon **sursable**.

Se ni preferas promenojn, ni povas admiri arbojn, densajn, nepenetreblajn arbarojn, abruptajn montojn, buntajn herbejojn, riverojn kaj lagojn, iradi laŭ vojoj borderitaj de arboj, inter duobla linio da arboj rimarkante, ke homoj povas esti kiel arboj – altaj kiel cedro, fortaj kiel kverko, timemaj kiel tremolo, sveltaj kiel betulo. Aldone ni konas diraĵojn: Altan arbon batas la tondro. La arboj malhelpas al li vidi la arbaron. Ne el ĉiu ligno oni faras violonon. Oni povas atendi sur tero ĝis sekiĝos la rivero. Ne konante profundecon, ne iru en la riveron. Li englutis riverojn da konjako.

Se ni deziras trapasi someron en la propra ĝardeno kaj labori sur la apudhejmaj **gazonoj** (**razenoj**) kaj **florbedoj**, ni devas uzi **ĉarumon**, **ŝpaton**, **fosilon**, **fos-forkon**, **ĝarden-tondilojn** aŭ **tondilegojn** (precipe por tondi **heĝon**). Ĉiuj plantoj bezonas akvon – do ni **akvumas** aŭ **surverŝas** ilin per **akvumilo** (**verŝilo**) kaj per **kaŭĉuka tubo**. En ĝardeno, sur parapetoj kaj balkonoj ni povas fiksi florkestojn kaj florpotojn. Finfine ni povas ripozi en **laŭbo**, la plej agrable kun la nigra kafo, **glaciaĵo** kaj bona libro.

Homoj plenfortaj, sendepende de aĝo, somere preferas ekskursi kaj vojaĝi. Tio povas esti **sciencaj ekskursoj**, ekz. kaŭze de geologio kaj botaniko, aŭ **kamparaj ekskursoj** kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj en **korboj** aŭ **dorsosakoj** t.e. **piknikoj**. Ni povas entrepreni pli longajn kaj pli malproksimajn vojaĝojn, ankaŭ eksterlanden. Ni bezonas ĉi-cele **transportilojn**: aŭtomobilon aŭ aŭtobuson (**aŭtoĉaron**), por moviĝi tra ŝoseoj utiligante **benzinstaciojn**. Se ni vojaĝas per trajno (vagonaro) grave estas elekti ĝustan vagonon kaj oportunan **kupeon** kun liberaj **sidlokoj**. Antaŭ vojaĝo ni devas akurate kontroli **horaron** (**hor-tabelon**) por aĉeti ĝustan bileton en **biletĝiceto** aŭ **perrete**. Pli forajn vojaĝojn oni realigas per **passaĝer-ŝipo**, **jeto** aŭ aeroplano (**flugmaŝino**, **aviadilo**, **aerŝipo**). Vojaĝante tra la mondo oni povas travivi interesajn aferojn kaj ligi utilon kun agrablo. Kaj kvankam francoj diras: Forveturi estas iom morti, valoras sperti senton, kiam: La ŝipo estas lulata de facilaj ondoj, kiam ĝi traplugas aŭ tratanĉas la maron, kaj aviadilo flugas super urboj, kamparoj kaj arbaroj liverante al ni neforgeseblajn impresojn.